**Cirkulero 44** por la amikoj kaj subtenantoj
de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626

Nordwalde, 96-05-03


Karaj amikoj kaj subtenantoj,


la instruistino Patrícia

de la 23a de marto ĝis la 13a de aprilo mi denove estis en Brazilo, kune kun mia edzo (Rudolf) kaj kun nia plej juna filo Harald. Dum Harald laboris 3 semajnojn en Bona Espero, ni venis kun du geamikoj tien nur dum la Pasko-tagoj. Estis kortuŝe por mi, revidi multajn infanojn post du jaroj. La plej malgrandaj, kiuj ne konis min, sed Rudolf, kuris al li kaj ĉirkaŭbrakumis lin. Estas malfacile, priskribi niajn sentojn: la infanoj de Bona Espero intertempe estas ia parto de ni.
Sed unue la plej frapa novaĵo:
**Bona Espero fondis filion en Alto Paraíso!** Sur la parceloj, donacitaj de la urbo, intertempe staras apud la dometoj de Maria kaj Ada ankaŭ la fundamentoj de pli granda domo. Tie loĝu pli aĝaj infanoj kaj gejunuloj, vizitante la 6an ĝis la 8an klasojn, kaj eventuale plue la 9an ĝis la 11an klasojn. En Bona Espero estas nuntempe nur la 1a ĝis la 5a klasoj.
La loĝado en Brasília per tio iĝos superflua. -
Jen superrigardo, kiuj gejunuloj apartenas al Bona Espero:
Lastan jaron **Clarimundo, João** kaj **Rosamira** finis la 8an klason. Ĉiuj tri plulernas nun en Brasília respektive Alto Paraíso en la 9a klaso, por atingi post la 11a klaso la kvalifikon, viziti universitaton. Tiun celon atingos **Amanda** jam en la somero kaj do supozeble ekstudos poste. Clarimundo apud sia lernado laboras kaj enspezas iom. -
João loĝos en Brasília, ĝis kiam la domo en Alto Paraíso estos preta. Rosamira Paske translokiĝis kun 5 aliaj knabinoj (Andréia, Fátima, Aline, Ursula, Ronicléia) en la domon de Ada en Alto Paraíso, ĉar la ĉiutaga transporto tien far la urbo ne funkciis.
Ni vizitis la knabinojn, ili bonfartas. Sed ili tamen bezonus paron de plenkreskuloj, kiuj loĝus kun ili, ĉar la kvartalo ne estas sen danĝero.
En Alto Paraíso ni vizitis ankaŭ la tombon de Lídia. La tombejo estis en mizera stato. La mortintojn la Brazilanoj ŝajne rapide forgesas...
Post la domŝanĝo, kiun mi raportis en la lasta cirkulero, loĝas 10 knaboj kaj 12 knabinoj en la nova domo de Bona Espero (la iama "domo de helpantoj"), krome Ursula kaj Giuseppe, kaj Patrícia kun sia fileto Breno. En la malnova domo estis ankoraŭ 3 knabinoj, plie Ada kun la malgranda Igor kaj la helpantino Andrea el Danlando. La ceteraj ĉambroj kaj la apuda dometo, en kiu ni loĝis, estas liberaj por helpantoj kaj gastoj. Krome dormas tie la knabinoj el Alto Paraíso, kiam ili semajnfine venas hejmen. La tuta nombro de prizorgataj infanoj estas do momente 36.
Ni konstatis denove grandajn progresojn ĉe la infanoj. Ekzemple ili - escepte de la tute novaj - bone ĝis bonege parolis Esperanton. Mirinda ankaŭ la farita laboro en la domoj kaj en la ĝardeno: ĉio estis en neriproĉebla stato. Fine nia trezoristo (Rudolf) post kutima zorga kontrolo de la kaslibroj povis atesti ekzemplodonan enordon. Resume: la homoj de Bona Espero, precipe kompreneble Giuseppe kaj Ursula, meritas denove grandan aplaŭdon kaj ĉiajn komplimentojn.
La urbo Alto Paraíso plupagas salajron por du instruistoj, nome por Ada kaj por la najbarino **Ilone**. Do, estas nia devo, pagi por **Patrícia** almenaŭ

gratifikon. Bedaŭrinde pro manko de financoj la posteno de **Cristina** finiĝis. Ni vizitis ŝin en Alto Paraíso hejme: ŝi nun bone parolas Esperanton kaj danke al Dio ĵus trovis ankaŭ pagatan laborlokon.
Instruistojn do Bona Espero havas, sed aliaj laborfortoj plumankas pene. Jes Ursula kaj Giuseppe post tiu kuraĝa elpaŝo en Alto Paraíso ne plu parolas pri foriro, sed aliflanke ili ne plijuniĝas, kaj ankoraŭ ĉio dependas nur de ili. Plie forfalas nun la pli grandaj knabinoj loĝante en Alto Paraíso - almenaŭ dum la semajno. **Do, ni pluserĉas parojn, kiuj ekloĝos en Bona Espero kiel helpantoj kaj posteuloj.** Ankoraŭ ni ne havas konkretajn kandidatojn, kvankam ni korespondas kun kelkaj interesatoj.
Paske estis ankaŭ la kunsido de la konsilantaro de la fondaĵo Bona Espero (Brazilo). Venis de Brasília **Enivaldo Alves Silva** kaj **Mario Garofalo**, el Goiánia **Inês Nunes de Andrade Machado.** Ĉiuj tri, kvankam loĝante sufiĉe for, subtenas Bonan Esperon ekde multaj jaroj, konforme al sia altranga kontrol- kaj gvid-funkcio. Al ili ni prezentis niajn zorgojn rilate la novan filion en Alto Paraíso:
- mankas laborfortoj, kaj tie kaj en Bona Espero mem
- la financoj por la buĝeto ne estas garantiitaj
- ne videblas jam posteuloj por Giuseppe kaj Ursula

La konsilantaro respektis niajn argumentojn, sed konsolis nin: malcerta estonto estas tute normala en Brazilo...



La plej multaj infanoj kaj gejunuloj post la serĉado de la Pasko-ovoj, kio pro pluvo okazis en la lernejo.

En la plej supra linio de dekstre: Andréia, Patrícia, Harald, Renato, João.

Restas la temo **financoj**. Lastan jaron Bona Espero ricevis multajn rektajn donacojn, parte tra la UEA-konto, parte el Brazilo, do ne de nia subtena societo. Per tiu mono oni pagis la ĝisnunan staton de la projekto en Alto Paraíso. Tial ni ne havas iun rajton kundecidi tiurilate.
Sed kiel statas Bona Espero mem finance? La situacio malpliboniĝis iom. Kulpas precipe la forfalo de la subvencio de LBA, la ŝtata organizo, kiun oni dissolvis. Sekve nia kontribuo al la ĉiutagaj bezonoj kreskis de 3.000 $ al 10.000 $ jare (vidu la apartan finkalkulon). Krome ni elspezas nun multe pli por gratifikoj laŭ decido de nia lasta membrokunveno. Jam tiuj du celoj forsuĉas ĉiujn niajn enspezojn (kiuj krome lastjare iom ŝrumpis). Ni devis eĉ dissolvi niajn rezervojn (escepte tiun por la kurenta konekso), kaj nia mono ne plu kovras la elspezojn por aliaj kurantaj kostoj (materialoj, riparoj, transportoj, ktp.). Tial ni nepre bezonas viajn pluajn donacojn por certigi la pluekziston de Bona Espero kaj ĝia lernejo. Tiurilate mi tre kore petas vian financan apogon. Ni ne allasos, ke la infanoj de Bona Espero devos esti resendataj al la mizero, el kiu ili venis.

*Bonesperane salutas*

*Hedwig Fischer*

Por ŝpari bankkostojn, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z", sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!
Poŝtkontoj de Universala Esperanto-Asocio/Rotterdam:
Belgujo: 000-1631831-97, Germanujo: Köln 3182 91-509 (bankkodo: 370 100 50)
Nederlando: Den Haag 37 89 64, Svedujo: 74374-0; Svisujo: Genève 12-2310-0